

# BRIGHTON-a Bulteno



ESPERANTO-SOCIETO DE BRIGHTON KAJ HOVE

MAJ/SEP 1984

## VIGLA SEMINARIO

Dudek kvin lernantoj alvenis por la unutaga seminario en Davigord Centre, la 17-an de marto. Dek naŭ estis absolutaj komencantoj, kaj ses estis progresantoj.

Ili venis ĉefe el Brighton, Hove kaj Worthing, sed iuj venis el Guildford, Maidstone kaj Londono.

### BONA ETOSO

Kvankam kelkaj komencantoj komentis, ke ili ne povis resti je la rapido de la prezento, fine ĉiuj estis ridantaj kaj en bona etoso. "La bezono ŝajnis esti por pli da informoj pri la lingvo, la movado, la kulturo pli frue en la kurso" klarigis kursodirektoro Helen Fantom. "Tamen, se estis iu, kiu tute ne ĝuis la tagon, li ne diris", ŝi aldonis.

Estis granda intereso pri la infanlibroj kunportitaj, pri la librobudo, ĉe kiu oni vendis kvardek pundojn de libroj, kaj pri la ekspozicio, de kiu malaperis granda stoko da unuaj lecionoj de la senpaga korespondanta kurso.

### KUNHELPIS

"Mi deziras danki al ĉiuj, kiuj helpis" diris Helen, kiu mem instruis la komencantojn, kun helpo pri konversaciigo de Margaret Kennedy, Wilf Carrick kaj Ian Fantom (kaj poste kvarjaraĝa Gavan).

Margaret, Wilf kaj Molly Buckle el Maidstone gvidis la konversacian grupon (kiun poste ĉeestis trijaraĝa Rolf). La ekspozicion, librobudon kaj teservadon entreprenis Ian, Hilary Gilmore, Christine Wieting kaj Edward Griffiths.

Nun la klubo elsendas demandilon al ĉiuj ĉeestintoj. Per tiuj informoj, oni intencas organizi eĉ pli bonan seminarion venontjare. Kostojn de la informilo pripagis Norwich Jubilee Esperanto Foundation, kiu subtenas esploradon pri la instruado de Esperanto.

● 25 students attended the successful One-day Esperanto Course at the Davigord Centre in March.

A questionnaire is being sent to all participants, with a view to organising an even better Course next year.

The costs of the leaflet will be met by the Norwich Jubilee Esperanto Foundation, which supports research into the teaching of Esperanto.

## BONVENON AL SUSSEX!

NIA ANO JOHN HARRISON, POST VIZITO AL LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN BUDAPEŝTO, LASTAN AŬGUSTON, REIRIS AL HUNGARIO LASTAN DECEMBRON POR EDZIĜI AL HUNGARA ESPERANTISTINO. LA NOVA EDZINO, KLARA ANNA HARRISON, ESPERAS ALVENI POR EKLOĜI EN WORTHING FINE DE APRILO AŬ KOMENCE DE MAJO.



Klara Harrison

Klara kaj John unue renkontiĝis en 1982, kiam John tranoktis en Budapeŝto survoje al la Someraj Esperanto-Universitataj kursoj en Gyula. Li pasigis du noktojn ĉe la gepatroj de Klara, kaj Klara gvidis lin tra la urbo.

Ili daŭrigis la kontakton, kaj rerenkontiĝis ĉe la Universala Kongreso lastan jaron, kaj poste ili feris ĉe lago Balaton. Klara poste vizitis Brition dum tri semajnoj en septembro kaj oktobro — sia sola ĝisnuna vizito al ĉi tiu lando.

### FAMILIA LINGVO

John nun lernas kelkajn vortojn de la hungara lingvo, kaj Klara kelkajn de la angla, sed krom tio ilia sola komunikado estas Esperanto. La geedziĝa ceremonio estis en Esperanto kaj la hungara, kaj tute nature Esperanto estos la familia lingvo.

Klara naskiĝis en Budapeŝto, kaj lernis Esperanton de sia patrino (konata en KELI) dum resaniga periodo en 1972

Ŝi estas nun ano de la redakta komitato de Budapeŝta Informilo, kaj ŝi ofte laboris kiel fremdulgvizitino. Polajn geknabojn de 'Esperantotur' en Bydgoszcz ŝi ofte gvidis tra Budapeŝto, kaj dum la UK ŝi kondukis ŝipekskurson laŭ Danubo, kaj grupojn de usonaj esperantistoj al Kecskemet kaj Szeged.

John reiros al Hungario fine de aprilo kun la espero ke Klara estos jam ricevinta la elmigran permeson, kaj ke ili povos ambaŭ alveni hejme kune.

### ● WELCOME TO SUSSEX!

*Esperanto will be the family language of newly-wed John and Klara Harrison when they settle in Worthing shortly. John met Hungarian-born Klara on Esperanto holidays in Hungary, and they were married — in Esperanto and Hungarian — in Budapest last December.*

*Klara is a tourist guide, and has worked for the Polish company 'Esperantotur' in showing Esperanto-speaking tourists the sights of Budapest.*

*"I don't speak many words of Hungarian; Klara has now learned a few words of English", John explained. Esperanto is just their normal way of talking to each other.*

## BEGINNERS START HERE...

*In this issue we have included two articles by complete beginners on their first impressions — see page 3*

*If you wish to find out more, pick up a copy of the first lesson of the free correspondence course from your library, or obtain a copy from: Wilf Carrick, 90a Carlyle Street, Brighton (tel. 695524).*



La fama Esperanto-verkisto  
**Reto Rossetti**  
prelegas pri  
**«La Maro  
en Esperanta Poezio»**

The map shows the area around the King Alfred Sports Centre. Streets include Sackville Rd, Connaught Rd, Church Rd, Grand Ave, and Blatchington Rd. Locations marked with 'A' are the Connaught Centre and the Urban Domo. Locations marked with 'B' are the Davigdor Centre and the Biblioteca. The map also shows the location of the King Alfred Sports Centre and the King Alfred Sports Centre. A scale bar indicates 2m/3km.

**Map Labels:**

- HOVE STN
- GOLDSTONE VILLAS
- CROMWELL RD
- DAVIGDOR RD
- BLATCHINGTON RD
- CONNAUGHT RD
- URBANO DOMO
- CHURCH RD
- BIBLIOTEKO
- al Brighton
- KING ALFRED SPORTS CENTRE
- 2m/3km

**Legend:**

- A** CONNAUGHT CENTRE
- B** DAVIGDOR CENTRE

**REGULA PROGRAMO**

|               |            |
|---------------|------------|
| 19.00 – 19.15 | – Babilado |
| 19.15 – 20.00 | – Prezento |
| 20.15 – 21.00 | – Diskuto  |

**ĉe Davigdor Centre**  
(vidu mapon)

# ESPERANTO- FIRST IMPRESSIONS

(— not necessarily correct!)

By DON PERRIMAN

Recently I attended a One-day Course held at Brighton for beginners in Esperanto. I went there with no knowledge of the language and came away with very little. This was not a reflection upon the Tutors, but of my own incapacity to absorb intensive tuition over a short period.

The presentation was clear, concise and humorous and most of the students were relaxed whilst absorbing the beginners' lessons. Some of those attending were teachers of Modern Languages and readily absorbed the principles of Esperanto. Some intended to proceed further with their studies of the subject.

Being more ancient and inclined to a leisurely approach to knowledge, I found this introduction to the language fascinating — once I had been able to find a moment to reflect on the day's events.

## MUSHROOMS

I bought a book and a 'Jen Nia Mondo' tape with a view to further investigation at home. I listened to the tape whilst wiping up the dishes, and received a gentle comment from the Lady of the House as to why I did not concentrate on French and then perhaps we would be able to have mushrooms

served with our meal instead of afterwards, as happened on an unfortunate occasion in France.

## STAMPS

However, the washing-up and the tape ended harmoniously, and I have received a packet from the E.A.B. over which to brood and convince myself that I am onto a good thing. I must confess that I have a rather selfish motive. As a result of my pastime, stamp collecting, I correspond in Fractured French or Spurious Spanish with collectors in Eastern Europe and South America. My correspondents' English is invariably better than my knowledge of their language. Now, if we all wrote in Esperanto... ? *Quien sabe?* (Kiu scias?, ed.)

● *Unuaj impresoj de komencanto ĉe la unutaga seminario. La kapo zumas, sed li daŭrigas!*

# NUN EBLAS

Nun eblas senpage transpagi monon al aliaj landoj de la Komuna Markato, se oni faras tion per ĝirkonto kaj specifas la kontonumeron de la ricevonto.

Tio evidentiĝis post kiam Wilf Carrick plendis al sia parlamentano, Andrew Bowden, pri la £3.50 postulata por ĉiuj pagoj eksterlanden. S-ro Bowden petis klarigon ĉe la ministro pri eksterlandaj aferoj (Minister of State, Foreign and Commonwealth Office), Malcolm Rifkind, kiu skribis la sepan de februaro, ke eblas transĝiri monon senpage.

Wilf do reiris en marto al sia poŝtoŝtelo por peti klarigon. Tie, oni donis al li pli ĝisdatan folion, menciintan pagon de nur £2.50, sed nenion pri senpage transĝirado.

Fine, li ricevis de la nacia ĝis servo en Bootle letereton klarigantan, ke oni povas senpage transĝiri eksterlanden, kaj kun tiu letereto estis nova folio kun sekcio: 'Pagante al transmara ĝirkonto — senpage'.

Tio havas gravajn implicojn por la Esperanto-movado, ĉar ĝi ebligas kotizadon al kongresoj, ferioj, asocioj, aŭ aĉeton de libroj facile kaj rekte ĉe la koncerna organizaĵo, anstataŭ ĉiam pere de peranto.

Wilf nun skribas al sia parlamentano por danki, kaj por diri, ke se tio estis rezulto de leteroj al parlamentanoj, la tuta afero valoris!

● *New regulations on paying money abroad free of charge have been announced by the National Girobank. This will have important implications for many Esperantists when sending subscriptions, congress fees, etc., to various organisations abroad.*

What use is Esperanto? The keen Esperantist can make friends in his local association and pen-friends throughout the world. If he wants to go on holiday anywhere in the world he can make contact with a local delegate and will then have willing interpreters and guides when he arrives. There are Esperanto magazines for specialist interests, notably for medicine, where world-wide interchange of information is of obvious benefit. By learning Esperanto you put yourself in contact not with just one culture but with all.

## ● NEŬO DE LA INAŬGURO

*Dupaĝa artikolo en "Incorporated Linguist" (printempo 1983, paĝoj 68-69) kiu mencias la inaŭguron de la Esperanto-Societo de Brighton kaj Hove, ĵus atingis nin. Elĉerpaĵon ni represas ĉi tie. Por legi la tutan artikolon, petu ĉe la klubo. La gazeto haveblas de la Institute of Linguists, 24a Highbury Grove, London N5 2EA, kontraŭ £7.59, aŭ £2 por unu ekzemplero.*

# THE RELUCTANT ESPERANTIST

Norman Ingle

I was walking round the public library when I spotted a leaflet headed "ESPERANTO LESSON ONE". Something for nothing and concerned with languages! I couldn't resist.

All you had to do was fill in the answers to the exercises and post it off with a stamped addressed envelope. I had no intention of doing so but I took the form into work and worked through it during my lunch hour. It seemed as straightforward as it claimed to be. The verb to be is *esti*. Present tense *estas*, future *estos*, past *estis*. To form these tenses for other verbs all you need to know is the stem concerned.

## Local association

I was invited to the inaugural meeting of the Brighton and Hove Esperanto Association in the Royal Pavilion. I arrived late — just in time for the interval! There were some 200 people there, ranging from veterans to toddlers who were running round saying "Bonan Tagon" to everyone. The mayor of Brighton said a few words in English and even fewer in Esperanto, and then we heard the enthusiastic singing by the London Esperanto Choir of songs from many countries.



# LA GRANDA DEBATO

Proponon, ke Esperanto estu instruata en la lernejoj, oni debatis la 10-an de marto ĉe loka debatsocieto en la komforta kunveno de la preĝejo St Johns en Palmeira Gardens, Hove.

La ideo debati Esperanton venis de ilia — kaj nia — ano Frank Tuley, kiu faris la sugeston dum li serĉis origin-alan temon, kiun ili neniam antaŭe diskutis.

## EDUKAJ KIALOJ

Frank mem agis kiel advokato de la diablo, kontraŭante la proponon. "Debato estas debato", li diris, antaŭ ol argumenti, ke Esperanto ne sukcesos. La proponanto de la propozicio estis Ian Fantom, kiu argumentis, ke estas bonaj edukaj kialoj enkonduki la lingvon en la lernejojn aldone al ĝia internacia uzo. La eltrovita fakto, ke Esperanto akcelas lernadon de aliaj lingvoj signifas, ke oni povas lerni Esperanton kaj la francan kontraŭ la sama tempoinvesto, kiun oni bezonus por lerni nur la francan.

## VOĈDONO

La plimulto de la parolantoj ŝajne jam estis decidintaj frue en la debato, kvankam unu persono deklaris, ke li ŝanĝis sian opinion favore al Esperanto meze de la debato.

La fina voĉdonrezulto estis: 8 por, kaj 13 kontraŭ. Se oni forprenus la voĉdonojn de la vizitantaj esperantistoj, tamen transigus unu voĉdonon ĉar la kontraŭanto estis subtenanto de Esperanto, la rezulto estus 6 por, kaj 12 kontraŭ.

## VEKIS REAGJOJN

La prezidanto de la kunveno komentis poste, ke la debato estis vigla, kaj oni vere trovis temon kiu vekis reagojn inter la ĉeestantoj.

Interese estas, ke se la debatrezulto spegulus nacian aŭ internacian opinion, tiuokaze certe estus sufiĉe da subteno por instrui Esperanton en multaj lernejoj (ĉu 10%?), tiel forigante la argumenton ke Esperanto ne estu instruata ĉar neniu instruas ĝin!

● A motion that Esperanto be taught in our schools was defeated by 13 votes to 8 at the local debating society in St Johns Church Hall, Hove. A number of speakers were sympathetic to Esperanto, but would not go as far as introducing the language as a school subject. A main argument for Esperanto in schools was that it had been found to be such a good introduction to language learning that one could finish up with as good a knowledge of French after one year of Esperanto and three of French as French children would after four years of French!

## MALLONGE...

**SCIENCEFIKCIAN KONFERENCON** en Brighton paske ĉeestos pluraj esperantistoj, skribis **Marjorie Brunner** el Somerset. Ni esploras!

**CHRISTINE WIETING** sukcesis — kun distingo — en la elementa ekzameno de EAB.

**UK EN BRIGHTON** — dato de prelego atendas decidojn en Londono.

**KURSO** en Connaught Centre komenciĝos je septembro 28.

**WORTHING** — ses personoj kutime ĉeestas la klubkunveojn. Multaj forfalis post la morto de Norah Dale. Ni provas revigligi ĝin per dissendo de tiu ĉi Bulteno.

## NIAJ NAJBAROJ

**HASTINGS Esperanto-Grupo** kunvenas la unuan merkredon ĉiumonate (escepte de aŭgusto), ĉe ges-roj F. Maitland, 74 Saxon Road (0424 440 981), ekde 7.30pm

**PEACEHAVEN** Esperanto-Grupo kunvenas ĉiun tri semajnojn mardmatene ĉe ies hejmo. Malgranda grupo; volas pligrandigi. Informas Bertram Russell, tel. Peacehaven (84 el Brighton) 5992.

**WORTHING** Esperanto-Grupo kunvenas merkredvespere (sed nur dumtrimestre) 7-9a horo en Worthing Adult Education Centre, Union Place (kontraŭ Connaught Theatre). Informas John Harrison, Flat 8, Stoke Court, Abbey Road, Worthing, BN11 3RW.

## SRILANKO

De Stefano Keller — Esperanto-instruisto ĉe la Kultura Centro Esperantista en Chaux-de-Fonds, Svislando — ni ricevis informojn pri nova 35-persona kurso en Kolombo, Srilanko.

Skribante al la Brightona Bulteno, s-ro Keller klarigis, kiel li prelegis en la publika biblioteko, kun traduko en la sinhalan kaj tamilan lingvojn, kaj ke poste li instruis tie dum unu semajno.

"Estas tre multekoste kaj nerealeigible por multaj el ili aĉeti lernolibrojn aŭ vortarojn", li skribis. "Eble vi havas troajn esperantaĵojn, ellegitajn gazetojn, librojn. Certe bone utilis tiuj ĉi ĉe manoj de la srilankaj komencantoj ... Bone efikus eĉ simpla postkarto aŭ letero", li klarigis.

Do, kiu povos helpi? La adreso estas: Esperanto-Grupo Srilanka, s-ro D.B. Jesudasan, Poste restante, 71 Pagoda Para, Nugegoda, Srilanko.

● A request for Esperanto books and other reading material for new beginners in Sri Lanka.

## KALENDARO

**MAJ.28: Weston-Super-Mare** Brita Kongreso.  
E-AB, 01-727 7821

**JUN.4: Londono**  
Kunveno de SAT-rondo.  
County Hall, London SE1, 18h30  
Ĉeftemo (Dave Wetzel): 'Socialists need Esperanto for International Understanding'  
Inf: SATEB, 29 Farrance Rd, Chadwell Heath, Essex RM6 6EB

**JUN.23: Dorking (Surrey)**  
"Festo de Internacia Literatura"  
Christian Centre, malantaŭ Barclays Bank, High Street, ekde 14h00.  
Enirprezo, 50p.  
Detalojn pri la Tradukkonkurso de Inf: Donald Law, 'Ruskin', Ashhurst Drive, Boxhill, Tadworth, Sv.

**JUL.14: Eastbourne (Sussex)**  
Somera Ekurso: Treasure Island (Eastbourne Pier, se pluvos).  
Ken Hadler, Hastings 422427

**SEP.9 (Saturday)**  
**OPEN DAY:** Connaught Centre, 10-12am; 2-4, 7-9pm.  
Esperanto Stand, manned all day. Demonstration Lesson, 2.30pm.

## ELDONITA DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRIGHTON KAJ HOVE

**Prezidanto:** Wilf Carrick, 90a Carlyle St., Brighton. Bn.695524  
**Vicprezidanto:** S-ino H.M.Fantom, 23 Kingston Lane, Southwick, Bn.594227.  
**Sekretario:** Hilary Gilmore, 12 Terminus Rd., Brighton. Bn.24818.  
**Kasisto:** S-ino R.F.May, 88 Donald Hall Rd, Brighton. Bn.684345.  
**Informoficisto:** I.D.Fantom, 23 Kingston Lane, Southwick. Bn.594227.

Kontribuojn por la Bulteno bonvolu sendi al la Informoficisto.  
Kotizojn bonvolu sendi al la Kasisto.

ESPERANTO-SOCIETO DE BRIGHTON KAJ HOVE / BRIGHTON AND HOVE ESPERANTO SOCIETY

Bonvolu registri min kiel anon de la societo por la jaro  
Please register me as a member of the society for the year

Nomo/Name: .....

Adreso/Address: .....

.....

.....

Bonvolu akcepti/ Please accept:

Kotizon de / Subscription of: £ 1-00

Donacon de / Donation of: £ -

Entute / In all: £ -

Subskribo / Signature: ..... Dato / Date: .....

If you would like further information about Esperanto please tick here ☐

Bonvolu transdoni al sendi al / Please hand over or send to:

Mrs Rhoda May, Treasurer, 88 Donald Paul Rd, Brighton, Sussex.

.....